

?irka? 500 forpasintoj pro varma ondo en Kanado kaj Usono.



Otavo, jul 1 (RHK) Almena? 486 homoj forpasis pro subita morto dum la lastaj kvin tagoj en la kanada provinco Brita Kolumbio, 361 pliaj kompare al la 165, kiuj kutime okazas en tiu periodo, raportis merkrede la estro de jura medicino de la teritorio, Lisa Lapointe, la? CBC.

Kvankam la ka?zoj ankora? ne estas difinitaj, Lapointe diris, ke "tre probable" la faktoro malanta? multaj el tiuj mortoj estas la varmego, kiu trafis okcidentan Kanadon lastan vendredon kaj avertis, ke la nombro estas provizora kaj plii?os la? la ricevo de tiuj jurmedicinaj novaj raportoj.

Pli sude, la usona ?tato Oregono registris almena? 63 mortojn pro altaj temperaturoj, 45 el ili en la gubernio Mutnomah, raportas USA Today. Pli ol dekdu-duono da mortoj ka?zitaj de temperaturoj estis konfirmitaj en najbara Va?ingtono.

Kaj en Kanado kaj en Usono, la plimulto de varmo-mortoj estis maljunuloj. En Vankuvero, Brita Kolumbio, du trionoj da ili a?is pli ol 70 jarojn, dum en la gubernio Mutnomah la a?o de tiuj mortigitaj de altaj temperaturoj varias inter 44 kaj 97 jaroj. Plej multaj el ili havis komorbidecojn.

Krom la mortoj, la evento ankaŭ kaŭzis ondon de enhospitaligoj. "Ĝi similis al tio, kio okazis en la fruaj tagoj de provo trakti la eksplodon de Kovim-19," diris doktoro Steve Mitchell, de Harbourview Medical Center en Seatlo, Vaŝingtono. "Ni alvenis al la punkto, kiam la instalaĵoj havis problemojn kun baza ekipaĵo, kiel ventumiloj," li aldonis.

La varma ondo, kiu ankaŭ kovras la Nordokcidenton de Usono kaj Kanado, kaŭzis pliiĝon de temperaturoj ĝis 10-15 gradoj pli ol normala en ĝi tiu jarsezono. Precipe ĝi kaŭzis, ke la urbo Lytton, en Brita Kolumbio, rompis por la tria tago sinsekve la rekordon de la plej alta temperaturo iam ajn observita en Kanado. Ĝi-marde 49,5 celsiusaj gradoj estis registritaj tie.

fonto: RT

<https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/262481-cirkau-500-forpasintoj-pro-varma-ondo-en-kanado-kaj-usono>



Radio Habana Cuba